Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2012, n-ro 09-10 (1287-1288)

Sennaciulo

Tem-dosiero "Publikaj Servoj"

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Konscio kaj Revolucio

La materiaj kondiĉoj estas la kunteksto en kiu disvolviĝas la sociaj ŝanĝoj, sed ĉi-lastaj ne fontas rekte el ili, sed el konsciaj individuoj.

Kutime oni kredas ke la ĝeneraligita mizero okazigas la grandajn sociajn ŝanĝojn. Temas pri antaŭjuĝo ĝenerale akceptata, kaj aparte enradikigita inter la maldekstrularo, kiu konceptas la homon kiel racian egoisman enton, kies deziroj estas precipe fiziologiaj kaj rilatantaj al konkretaj materiaj interesoj, hom-aspektan beston sen cerbo nek animo. Sed la politikaj kaj moralaj idealoj estas pli gravaj por la homo ol la ekonomiaj interesoj.

La ĝenerale akceptata opinio pri tio, ke en la pasinteco estis pli da bataloj ĉar estis pli da mizero, estas malvera.

La kamparaj sudhispaniaj salajruloj estis aparte batalemaj, sed iliaj salajroj estis sufiĉe altaj por permesi al ili ĝui komfortan vivon (el fiziologia vidpunkto). Fakte, antaŭ la tiel nomata Hispana Intercivitana Milito estis eĉ migrado de laboristoj el la urboj al la kamparo, allogitaj de tieaj altaj salajroj.

Asturaj (Asturio estas nordhispania regiono) laboristoj, kiuj estis la plej alte salajrataj el tuta Hispanio, okazigis en 1934 plej radikalan revolucian agadon, armite atakante kernajn potenco-centrojn: Civilan Gŭardion (aŭ Gvardion, laŭ via prefero), Policon, Armeon... Ili estis ankaŭ tre legemaj kaj debatemaj, kultaj, aparte dignaj kaj solidaraj, integraj, vere homaj homoj.

La revoluciaj agadoj dum la Hispana Intercivitana Milito ne estis okazigitaj pro malriĉeco. Se la mizero estus la kaŭzo de la tiutempaj ribeloj, ĉi tiuj estus devintaj pli intense disvolviĝi en Italio aŭ Portugalio. Sed en Italio, krom iuj grupoj da kampar-laboristoj, la rezistado al la faŝismo apenaŭ ekzistis. Kaj en Portugalio, kie la mizero, eĉ malsato, estis ĝenerala, okazis nenio menciinda. Dume, en tiutempa Hispanio, sen aparte videblaj malsato nek mizero, la ĝenerala vivnivelo estis kontentiga (el fiziologia vidpunkto) kaj, eĉ pli signifoplene, tiu vivnivelo pli kaj pli altiĝadis.

La ekonomia krizo kiu okazis en la jaroj 1973-75 trafis aparte Usonon, ĉar al ĝi aldoniĝis la efikoj de la malvenko en la Vjetnama Milito. Estis granda inflacio kaj la senlaboreco draste altiĝis en 1975. Sed tio ne okazigis popolajn ribelojn. Tute kontraŭe: la diversaj protesto-movadoj, aktivaj ekde la 60-aj jaroj, abrupte malaperis. Kaj tio ĉar la aktivuloj flankenlasis la politikajn idealojn por dediĉi sin al la propraj ekonomiaj interesoj, tute natura sekvo el ilia hontinda akceptado de la burĝa antaŭjuĝo kiu prioritatigas la stomakon super la menso.

Multe pli grava estis en Usono la krizo de 1929, kiu provokis altiĝon de la senlaboreco ĝis 25%, sed tio okazigis nenian revolucion.

En Germanio, la jaron 1932, la senlaboreco estis eĉ pli alta (31%), sed anstataŭ revoluciaj ribeloj alvenis la naziismo.

En Hispanio, la jaron 1993, la senlaboreco altiĝis ĝis senprecedenca nivelo (24%), sed la nura konstatebla sekvo estis la alveno al la registaro de dekstrula politika partio, rekta ido el la frankisma reĝimo.

En Rusio kaj aliaj orienteŭropaj landoj la vivnivelo draste ŝrumpis en la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento, sed neniu minimume grava protesto-movado okazis. Tute kontraŭe: regis la rezignacio, la akceptado de la fatalo.

Afriko, kie malriĉeco estas tre intensa, ne estas aparte avangarda rilate al revoluciaj movadoj. Anstataŭe, krimaj perfortoj abundas.

Aparte reliefiginda estas, nuntempe, la analizo de *Marx*, kiu, laŭlonge de sia tuta vivo, kaj tre signifoplene en la inaŭgura manifesto de la Internacia Laborista Asocio (1864), taksis la politikan agadon plej esenca tasko de la konscia proletaro por atingi la detruon de la kapitalismo. Kaj por altigi tiun revolucian konscion endas prioritatigi la batalon de ideoj, ne prifajfi ĝin. ★

Pedro Sanz (Septembro 2012)

Enhavo

Konscio kaj Revolucio 2

Tem-dosiero "Publikaj Servoj" 4

Redaktangulo 4

Priorganizaj principoj de publika sanservo 4

Reformoj ne devige signifas restriktojn 5

Sano ne estu merkataĵo! 6

SAT Aktivas 7

Religiema fenomeno de Pollando 7

Ĉu nova frakcio de SAT? 9

45-a datreveno de la forpaso de Tania la Gerilanino 11

Por kio ŝpari elektron? – Elektroprovizo kaj atomcentralo en Japanio 12

Marŝo de ministoj 14

Deklaracio de Kembriĝo pri Konscio 15

Malarmado – Konvencio de Oslo 17

Antaŭ Granda Milito 18

Post la granda milito: alvoko al la diplomatoj 19

"Los Indignaos"kaj ion pli 20

Darvino, la heroo de la burĝaro 22

Reago al alterna sistemo de metilernado 24

Reago al Verduloj kaj SAT 24

SAT-aj diversaĵoj 25

Mil naŭcent okdek kvar de *George Orwell* 25

Listo de donacoj 3a jarkvarono 2012 25

Novaliĝoj 25

Novaj perantoj en Ukrainio kaj Usono 25

Nekrologo 26

Venonta Kongreso en Madrido 26

SAT-aj post-kongresaĵoj 27

Gvidrezolucio de la 2012-Kongreso 27

Raporto pri kongresaj laborkunsidoj 2012 28

Letero de V. Ĥodin post la Jalta kongreso 30

Raporto pri la kunsido de la Liberecana Frakcio dum la Kongreso en Jalto 31

Raporto de la Vegetara Sekcio pri la SAT-Kongreso en Jalto, 2012 31

Lingvistikaj observoj dum la 85-a SAT-kongreso 32

Jalto 2012: strandumado, ekskursado kaj klerigado 34

Praktikaj *informoj*

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr
Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Tereza Sabatier
Kasistino: Franjo Lévêque
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

Sennaciulo

Ĉefredaktanto: Robin' Beto
Enpaĝiganto: Pierre Soubourou "Ŝtonĉjo"
Ceteraj redaktantoj: Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale

Kontribuojn sendu elektronike al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: franjo.leveque@gmail.com

Libromendojn sendu al:
libroservo@sat-amikaro.org
Librajn eldonproponojn sendu al:
pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.

Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567